Heinrich Heine,

# Alpremu la vangon al mia vang'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Alpremu la vangon al mia vang',
Ke niaj larmoj kunfluu,[3]
Kaj vian koron al mia kor',
Ke niaj flamoj unuu.[4]

Se en la flamon enverŝas sin
De niaj larmoj fluo
Kaj se mi firmege brakumas vin
Mi mortas pro la am-ĝuo.

*Traduko de la Germana poemo "Lehn deine Wang' an meine Wang"' de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-542-1087 (2010-05-27 09:07:40)*

*El la "Libro de la Kantoj", parto "Lirika intermezo, I".*

[3] aŭ: Ke niaj larmoj kuniĝu,
[4] aŭ: Ke l' flamoj unuiĝu.